



TEA-BULTENO

9^a JARO

MAJO - JUNIO 2006

NUMEROJ 5-6

Maja Programo

02 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
05 - vendredo	20.00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
09 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
12 - vendredo	20.00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
13 - sabato	17.00 - Solena Meso celebre al 100-jariĝo de TEA
16 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
19 - vendredo	20.00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
23 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
26 - vendredo	20.00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
30 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo

Junia Programo

02 - vendredo	Festotago
06 - mardo	20.00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
09 - vendredo	18.00 - Inaŭguro de la ekspozicio "Kara Amiko, mi skribas al vi..."
12 - lundo	ekde la 14^a ĝis la 20^a horo, porokaza filatela stampo pri la Ekspozicio, ĉe Palazzo Costanzi

Dum ĉiuj mardoj kaj vendredoj, ekde la 19^a h, en TEA-sidejo, oni kunvenas por labori pri la diversaj aranĝoj, enprogramitaj por la celebrado de la 100-jariĝo de la Asocio. Estas varme alvokataj kaj invitataj ĉeesti ĉiuj bonvoluloj kaj dezirantoj, ke ĉi festado estu kiel eble plej grandioza kaj sukcesa! Estos ege bezonata via helpo kaj kunlaboro, ĉefe por la muntado de la ekspozicio. Por pliaj informoj kontaktu Edvige aŭ Elda. Dankon!

Solena Meso en Esperanto Preĝejo Beata Virgulino de l'Rozario Piazza Vecchia - Trieste Sabaton la 13^{an} de majo je la 17^a horo

Kune ni inde celebru ĉi tiun gravan eventon por la tuta triesta esperantistaro per solena danko Di-Servo: TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj malhelpoj laŭirintaj ties 100-jaran vojon, sukcesis superi ĉiajn malfavorajn cirkonstancojn, precipe en la periodoj de la du mondmilitoj, kaj atingi en sufiĉe bona farto ĉi rimarkindan celpunkton. Kune ni komencu ĝian duan jarcenton kaj kune preĝu, ke ĝi plue longe vivu, ĝis kiam ne plu estos bezonata la laborado de esperantistoj, ĉar ja Esperanto estos atinginta sian celon.

Partoprenos en la Meso la konata Virvoĉa Koruso MAX REGER, kiu - sub direktorado de Ĥorestro Bruno De Caro - akompanos la celebradon per plej sugestoplenaj kantoj.

La celebrantoj estos *Don Nello Marcuzzi*, de la Diocezo de Udine kaj *Don Antonio Dessanti*, paroĥestro de la Preĝejo Beata Virgulino de l' Rozario.

Honoros nin per sia ĉeesto Lia Eminenca Moŝto Episkopo Eŭgeno Ravignani.

Kara Amiko, mi skribas al vi...

Poŝtkartoj en ekspozicio

Palazzo Costanzi - Trieste
de la 9^a de junio ĝis la 2^a de julio 2006

POŝTKARTOJ: IOM DA HISTORIO

La origino de "poŝta karto" datiĝas je la fino de la 19^a jc, proksimume je la jaro 1870^a. Ĉi tiu novtipa komunikilo havis la privilegion, pro dekreto de la tiama "Ĝenerala Poŝta Unuiĝo", kelkajn jarojn pli poste alinomita "Universala Poŝta Unuiĝo", vojaĝi per reduktita tarifo. La nomo "Poŝta" ne signifis ke temis pri specifa eldonaĵo de Poŝta Unuiĝo, sed simple ke ĝi estis oficiale akceptita kiel korespondobjekto, tre taŭga ilo, tamen nun malhavana la letersekretion.

Ekde 1897^a jaro ekfloras la merkato de bildkartoj, kiuj tuj havis grandan sukceson. La bildoj, ĝis la lastaj dek jaroj de 1800, plej ofte prezentis vidindaĵojn urbajn, por poste pli variigi kaj riĉigi danke al kontribuo de valoraj desegnistoj. La poŝtkarto iĝis tiele mesaĝisto de eventoj, manifestacioj, bondeziroj, komercaj varbadoj kaj ankaŭ de ĉiutema propagandado.

vanità



Ina vestajaro
Ĉio por novedzino

VANITÀ sas

cl. Dodì B. & Del Rossi R.

34122 TRIESTE

Corso Italia, 37 - Tel. 040 632340

Cod. Fisc. e part. IVA 00082530320

Ĝis la jaro 1905^a la komunikenda mesaĝo kovris tre etan spacon sur la bildigita flanko. En la postaj jaroj la dorsa parto estis duigita, tiel ke ĉe unu parto estis spaco por la adreso kaj poŝtmarko, ĉe la apuda por la skribo de korespondaĵo. Tiamaniere la bildo kovris la tutan grandon de la karto.

Samtempe kun la apero de tiuj grafikaj kaj fotografaj ĉefverkoj, aperas la kolektanto, kiu serĉade vagas por trovi tiujn kartojn, laŭ la temo de li/ŝi plej ŝatata, aperintajn antaŭ 10, 20, 30 aŭ eĉ pli da jaroj!

La unuaj bildkartoj aŭ poŝtkartoj surhavantaj la skribaĵon: "Universala Poŝta Unuiĝo" en la internacia lingvo Esperanto aperis ĉirkaŭ la jaro 1902 kaj tiuj komencis pilgrimi tra la mondo, kunportante tiun deziron kaj emon komuniki je "Universala" nivelo.

Sed poŝtkarto ne estas nura ilo por komunikadi, kiun, post plenumo de ĝia momenta tasko, oni kuŝigas forgesita fone de iu tirkesto aŭ (eĉ pli terure!) oni forĵetas en rubaĵujon! Poŝtkarto rakontas kaj revokas al memoro la historion, la historion de la homo, de ties ideoj kaj idealoj, de ties eraroj kaj heroaĵoj, helpas rekonstrui la pasintecon kaj ĝin pli bone kompreni, por ĉion pli serene klarigi al si mem kaj al aliaj... ĝi pripensigas... kaj foje eĉ naskas iom da nostalgio pri tio kion la bildo revokas al la menso kaj ĉefe al la koro.

Per tiuj ĉi poŝtkartoj, kiel en filmo je 8-milimetra paŝo, antaŭ la okuloj parados la historio de la internacia lingvo Esperanto, en la vizaĝoj de ties personecoj, eminentaj kaj ne, en la pejzaĝoj urbaj, kamparaj, ĉemaraj de la hieraŭa kaj hodiaŭa tempoj, en la grafikaĵoj buntaj aŭ simple nigraj-blankaj, en tiuj skribitaj frazoj, kiuj ĉiel komprenigas al ni, ke gravas, tre gravas, por ĉiu homo komunikadi, daŭre komuniki por pli bone kompreni unu la alian.

Elda Doerfler

En la ekspozicia salono estos videblaj bildkartoj/poŝtkartoj ekde 1906 ĝis 2006. Temas pri vojaĝo longa tutan jarcenton, dum kiu eblos ekkoni la pensmanierojn de niaj pioniroj, kiel ili ŝatis reprezenti Esperanton kaj ties idealojn; kiel Esperanto estis uzata ne nur por interkompreniĝi, sed ankaŭ kiel ilo de propagando de propraj ideoj; kiel grafikistoj de antaŭ 100 jaroj kaj de jaroj pli proksimaj al ni ĝin proponis... Ĉion ĉi vi povos malkovri, se vi vizitos la ekspozicion "**Kara Amiko, mi skribas al vi...**", de la 9^a de junio ĝis la 2^a de julio 2006 en *Palazzo Costanzi*—Trieste.

Kvizo de Bardhyl Selimi **LA FALSA MONERO**

Surtable estas entute 80 moneroj, el kiuj nur unu estas iom pli malpeza (ni diru, ke ĝi estas falsa).

Ĉiuj aliaj estas tute sampezaj kaj kompreneble ĉiuj moneroj estas samaj laŭaspekte. Mi disponas pri pesilo je du pesiltasoj sed sen peziloj.

Ĉu vi kapablas diveni, kiom da pesigoj estas bezonataj por ke ni sukcesu distingi la falsan moneron?

Ĝenerale, se ni havus N-monerojn, kiom da pesigoj estus bezonataj?

Nu, matematikistoj, elprovu vian kapablon kaj solvu ĉi tiun problemon. Inter solvontoj ni lotumos belan premion, kiel kutime! Bonan ... pe(n)sadon!

INTER KARSTO KAJ ADRIATIKA MARO 1^a Internacia Somera Renkontiĝo Triesto, 6-12 aŭgusto 2006

Unu el la celoj de niaj ekskursoj:
vizito de la Kastelo de *Duino*, Karsta panorama
promenado desur la rokoj al la maro, laŭ la pado *RILKE*

Promenade kun poeto Rilke tra la parko de Duino ⁽¹⁾

Netrairebla rokangulo rigardanta al la tempesta Adriatika Maro. Du vidalvidaj kasteloj: la unua preskaŭ tute ruiniĝinta, la dua bela kiel sepcentjara reĝejo, dronanta en parko densa je rozoj kaj begonioj.

La vizitantoj povas malaperi tra aleoj de cipresoj, de kiuj rigardi al la bluega maro aŭ admiri la kolorojn de plurcentaj florspecoj, kiujn kontraŭ *bora* ⁽²⁾ kaj saleco ŝirmas heĝsistemo, dense interplektita.

Plie ili povas revivigi la gloron de kortego, kiu famiĝis tra la tuta Eŭropo per siaj eleganteco kaj amo al kulturo. Tiu gloro, tiel klare videbla en tiuj fascinaĵoj, tra kiuj paŝis reĝoj, poetoj, muzikistoj, samkiel en la memorajoj, ameme kolektitaj de familio *von Thurn und Taxis*, ekde jarcentoj loĝanta en tiu ĉi rezidejo. La ora epoko de la kastelo, kiu de defenda fortikaĵo por Habsburgoj kontraŭ turkoj fariĝis reĝejo, kulminas fine de la 19^a jarcento, kiam du eminentaj virinoj, *Tereza Thurn-Hofer Valsassina* kaj ties filino *Maria von Thurn und Taxis*, malfermis la artaĵo-riĉajn salonojn al la plej altsonaj nomoj de eŭropa kulturo: ĉi tie gastis *Johann Strauss* kaj *Franz Listz*, kiu en ĉi ĉambroj muzikigis poeziaĵojn de princino Tereza: "La Perlo". Ĉi tie gastis poetoj kiaj *Paul Valery*, *Hugo von Hofmannsthal*, *Rainer Maria Rilke*. Ĝuste al *Rilke* titoliĝas belega panorama pado, kiun la poeto ŝatis laŭiri dum siaj oftaj restadoj en *Duino*: kaj ĉi tie *Rilke* kreis siajn famajn "Duinaj Elegioj"-n. Profunda intelekta amikeco ligis lin kun princino Maria, kiel atestas ege longdaŭra, 17-jara, interŝanĝo de leteroj, poste publikigitaj kaj plurlingven tradukitaj.

Sed la salonoj de la Duina kastelo, de jaro al jaro, aliĝis, sekvante la kurenton de la kulturaj modoj, kaj do, sur la supraj tapiŝoj de salonoj laŭ la stilo Luizo 15^a, promenis ankaŭ *Eugene Jonesco*, *Gabriele D'Annunzio*, *Mark Twain*, *Karl Popper*, *Sigmund Freud*, kies portreto, krajone subskribita fare de *F. Schitzer*, admireblas ĉe iu ĉambromuro. Ĉi tie, kompreneble, restadis ankaŭ eminentaj regnestroj: Napoleono kaj ties edzino *Josephine*, Elizabeto de Aŭstrio, Maksimiliano de Habsburgo, Francisko Ferdinando de Aŭstrio: ĉi lastan tiuj ĉambroj gastigis antaŭ lia lasta vojaĝo al *Sarajevo*: historio tre morne batsonoris en tiuj salonoj.

Eble, ĝuste por mildigi tiun mornecon, la Duinaj princoj inventis por si mem plezurajn hobiajn: jen, komence de '900, princino Eŭgena el Grekujo, patrino de princo Karlo Aleksandro, kreis belegan puphejmon per pacienca, preskaŭ 20-jarlonga, laboro. Kaj la ĉiam nelacigebla kaj inventema princino Maria, en la dua duono de '800, al la parko donis la ankoraŭ tre aktualan karak-

terizan aspekton, kiun en 1956 princo Raimondo pliperfektigis.

Aŭtentika defio estis krei parkon sur ĉi tiu rokspro-
no, pro la fortikaj vento-puŝoj de la *bora*, kiuj ĉi-loke atingas rapidecon de 120 kilometroj hore. Pro tio princo Raimondo kreis vojiron per aleoj, aleetoj kaj anfraktoj, protektantaj, samkiel kulisoj, aleo-tunelojn densajn je rozoj, vandojn tegitajn je begonioj kaj plumbagoj, bedojn de valeriano kaj salvio, ĝisfunde al la malnova fosaĵo, kiu fariĝas hodiaŭ granda bedo florplena.

Vere malfacilas malforgesu, en tiu ĉi medio, ke la du malsamtempe starigitaj fortikaĵoj, komence de sia historio, estis nuraj defendaj gardoturoj kontraŭ trafikoj de la adriatikaj korsaroj, kiuj per siaj rapidegaj kaperŝipoj eĉ la potencon floton de Venecio sukcesis ĝeni. De la malnova, 10-jarcenta, kastelo, kies pitoreskan vidon eblas ĝui desur la nova konstruaĵo, restas nur la murapogiloj kaj la unua-etaĝa parto ĉe la centra turo: en 1369 ĝi sukcesis rezisti al venecianoj, kiuj rezignis pri ties konkero. Post kelkaj jaroj la estro de Triesto, *Ugone el Duino*, starigis novan rezidejon, ĉar liaopinie la malnova kastelo estis tro malvasta. Hodiaŭ el ĝi restas nur malmultaj ruboj kaj malnovaj legendoj, kiel tiu de la Blanka Damo, repudiita edzino, kiun kompatema dio transformis en klifon, por ĉiam de la maro kisisitan.

El artikolo de Renata Mambelli (I viaggi di Repubblica 26 giugno '03) tradukis VIGLO

⁽¹⁾ *Duino*, turisma loko ĉe la Triesta golfo.

⁽²⁾ *bora*, malvarma kaj seka vento, blovanta puŝope (eĉ pli ol 140 km/h) el ENE en la baseno de alta Adriatika Maro, aparte sur la Triesta golfo.

HO, TRIESTO!

*“Amikoj de amikoj estas miaj amikoj”
Omaĝe al Centjariĝo de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO*

Amikoj de l' Amikoj!... Bonvenas la trezoro,
feliĉo en la vivo pro bela vivostilo,
Amikaro tutmonda, ne nur ĉi en Brazilo,
amikoj je distanco kaj ene de la koro.

Triesta Asocio, la nesto centoj-jara,
de tia Amikeco je formo de kanzono!
Mi kantas pri Triesto, mi estas baritono:
Triesto brilas kore, ĝi estas urbo rara.

Ne tristo en Triesto, valoras ĉi atesto!
La ĉarmo de la homoj, kaj brilo en l'okuloj
eliras el la koroj, sen pezo de postuloj:
Triesto estas nesto! Triesto estas festo!

*Rio de Janeiro, la 8^{am} de aprilo 2006
Jorge das Neves poeta@infolink.com.br*

Divenaĵo de Viglo: Aŭtunaj folioj

Povraj folioj, mortintaj kaj velkintaj,
falas sur vin la larmoj tre varmigaj,
dum la tepida aromo memorigas
dolĉajn, per vi akiritajn, malstreĉiĝojn...

Nia Viglo elpensis por vi ĉi tiun kaprompigilon. Nu, bonvolu iomete cerbumi, kaj poste sendi la solvon al la redaktanto, poŝte, rete, telefone, fakse. Estos lotumado de eta premio.

TRIESTO KASITA

Malkovru nekonatajn erojn de nia urbo!

LA STRANGA KAPVESTAĴO DE L' MALJUNULO

En tiu kvartalo, nomata “Gretta”, fine de la strato “del Cisternone” (de l' cisternego), admireblas tre kurioza skulptaĵo. Ĝi prezentas vilaĝanon de la 20^a jarcento, kiu, sur la hejma fasado, metis propran buston, intencante tiel eternigi sin mem.

La nekonata persono surhavas la faman *caregon*-on (seĝego), tipa pelta kapkovrilo de tiutempaj kamparanoj.

Ĝia precipa karakterizo estis protekti orelojn kaj kolon kontraŭ malvarmo per mallevido de la rando, kiun ĉe la skulptaĵo ni vidas levita.

La stranga kapvestaĵo ricevas tian nomon pro sia formato, memoriganta grandan seĝon, “*carega*” en la triesta dialekto el helena etimo.

3ESTULO

El la Monda Mozaiko ĉe Edukado.net

FORPISIS TELEGRAFO

**- STOP - POR KONDOLENCI
UZU INTERRETON - STOP -**

Funebru! La “Telegrafo” kiu forte kontribuis naski nian epokon de fulmkomunikado, ne plu ekzistas. La 27^{am} de januaro 2006, *Western Union* ⁽¹⁾, la usona kompanio kiu kreiĝis en 1855 por ekspluati la tutnovan telegrafteknikon, kaj longtempe posedis ĝian kvazaŭan monopolon, diskrete anoncis, ke la servo ne plu haveblas. Rimarkinda estas la fakto ke la mesaĝon oni dissendis pere de interreto, kiu tiel finekzekutis sian antikvan konkurenton.

Kiuj nun levetas la ŝultrojn, devus jes, ja konsciiĝi pri la saltego antaŭen, kiun estigis la telegrafo al tiuj homaj aktivaĵoj, kiuj dependas de komunikado. Kune kun la trajnreto ĝi longe estis la nervsistemo de la usona - kaj ankaŭ tutmonda - komerco. Antaŭ ĝia apero, ekzemple, la plej rapida maniero sendi mesaĝon de Novjorko al Kalifornio estis la fama *Pony Express* ⁽²⁾, la rajdantaj kurieroj, kiuj bezonis por tia vojaĝo minimume dek tagojn. Pere de la telegrafo daŭris la komuniko nur malmultajn minutojn.

La bazo de la tuto estis la Morsa kodo, sistemo por sendi tekston, konsistantan el literoj kaj ciferoj, transformitaj je kodoj de longaj kaj mallongaj signaloj kaj paŭzoj. La sistemo estis inventita en 1835 fare de S-ro Alfred VAIL kaj S-ro Samuel MORSE, la usona Leonardo, inventisto kaj pentristo. La unua mesaĝo estis sendita la 24^{am} de majo 1844, inter Baltimoro kaj Vaŝingtono.

Ne estas surprize ke, dum pli ol cent dudek kvin jaroj, ĉiuj gravaj novaĵoj iris “tra la drato”. Militdeklaroj, pacanoncoj, la ŝipopereo de Titanic ⁽³⁾, kaj ĉiuj gravaj etapoj de la vivo de milionoj da homoj prenis la saman vojon. La nura vido de la famaj flavaj kovertoj de la telegrafo estis sufiĉa por bategigi la koron enbruste. En 1929 sendiĝis ducent milionoj da telegramoj - en 2005 nur 21000.

Longe ankoraŭ, malgraŭ la malapero de ĝia estokialo, la fama minimuma stop-stilo, kiu karakterizis la no-

van komunikilon, restos simbolo de koncentrita informado, redaktostilo, kiu kelkfoje ŝajnis esti poezio.

La lastaj dekoj da mesaĝoj estis sufiĉe tipaj: naskiĝtagaj bondeziroj, gratuloj al novgeedzoj, kondolenco pro forpaso, kompreneble helpopetego kaj du-tri tutlastaj telegramoj de nostalguloj: STOP-LARMO-STOP.

La tekston kompilis: Sylvain Lelarge

- 1) Western Union [ŭestern unionj]
- 2) Pony Express [poni ekspres]: poneo-ekspreso
- 3) Titanic [tajtenik]: Reĝa Poŝt-Vaporŝipo Titana, luksa vaporŝipo pereinta la 15^{an} de aprilo 1912, dum sia unua vojaĝo

Esperantistoj en Placo Sankta Petro

Post la mesaĝo, Papo Benedikto la 16-a adresis bondeziron en 62 lingvoj. En Esperanto li diris: "Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta". La bondeziron en Esperanto (antaŭlasta, post la maoria kaj antaŭ la latina) atendis en placo Sankta Petro la grupeto de esperantistoj, gvidataj de Giovanni Conti, kiuj, jam nun tradicie, ĉeestas, Paske kaj Kristnaske, en la placo kun siaj paneloj kiuj konsistigas la vorton Esperanto.

La roma esperantisto Ranieri Clerici estis intervjuita de la satelita televidstacio *Canale Italia*. Plurfoje la televida elsendo montris la grupon. Dum la rekta elsendo la subtitoloj de la itala televido por neaŭdantoj, anoncis, ke "la Papo bondeziras Bonan Paskon en Esperanto".


AL ITALA KAJ TUT-MONDA ESPERANTISTARO
Bonvenon en la plej grava kaj grandioza evento de Esperantujo, nome VIA Universala Kongreso, ĉijare okazonta en la belegra Florenco!

91a Universala Kongreso de Esperanto
29 julio - 5 aŭgusto 2006

THE NEW YORKER



Mi forgesis la nomon de l'kuracilo, sed ĉe televido ĝi muzikas pli-malpli tiele: "Ya-dee-dum-dee-rah-te-dum-dee-rah-dee-dum".



Krabo kun tamarinda saŭco

Per ĉi recepto vi konatiĝos kun la kuirarto de Vjetnamoj: ĝin mi ricevis de mia amikino Mai Ahn el Ho Chi Minh-urbo. Mi kredas, ke ĝi estas tre interesa ekzemplo de kuirado el lando tiel malproksima de ni. Ĉu vi pretas ĝin elprovi? Mi opinias ke indas. Scivoleme mi atendas viajn komentojn!

INGREDIENCOJ

2 kg	da kraboj
1	tamarindo
iom	da fiŝsaŭco
1 bulbo	de cepo
2	ajleroj
iom	da salo
iom	da sukero
iom	da glutamato de natrio

PREPARADO

Tranĉu la krabojn en 4 pecojn kaj peklu tiujn kun la bulbo, ajloj malgrandpistigitaj, sukero, salo, glutamato de natrio kaj fiŝsaŭco dum 15 minutoj.

La tamarindo, senkerna, moligu en iom da akvo.

Metu oleon en kaserolon, ĝin varmigu kaj aldonu la krabojn: per granda fajro daŭre ilin miksu en la ujo. Poste aldonu la tamarindon moligitan kaj daŭre miksu ĝis plena kuirigo.

Mi esperas, ke vi sukcese kuiras ĝin.

Bonan apetiton deziras Mai Ahn!

Malferma Tago en la Centra Oficejo

La venonta Malferma Tago okazos sabate la 13^{an} de majo, en la CO en Roterdamo. Stefan MAUL, konata Esperanta ĵurnalisto kaj redaktoro de la magazino MONATO, estos la ĉefa. MAUL prezentos sian ĵus aperintan verkon EL VERVA VIVO ĴURNALISTA, en kiu li interalie klopodas klarigi, kial li estas kaj restas konvinkita adeptito de la ideo de Zamenhof. Nekutiman prelegon faros profesoro RUĜNAZUL', por kiu la elpaŝo en la maja MT estos premiero en tiu ĉi populara aranĝo, kiu okazos jam por la 24-a fojo. Premieran prezenton spertos ankaŭ la filmo de Petro BALAZ pri la pasintnovembra MT kaj pri la vivo en la CO. Oni montros ankaŭ filmon pri la Esperanto-rilata kvizo en la ĉi-jara Muzea Nokto de Roterdamo. Kiel tradicie, la vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La Malferma Tago daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it

Grupa ttt-ejo: [//it.groups.yahoo.com/group/](http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina)

Associazioneesperantistatriestina

Peŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtekkonto N° 10834349